

Enskribo

pri la komitata kunveno okazinta la 2. II.1953 en kafejo Slavia. Ĉeestis gesamideanoj Vondroušek, Friedrich, Scheiber, Borkovec, Kořínek. S-ano Vondroušek malfermis la kunsidon je la 20.30 h kaj laŭ lia instigo tralegis s-ano Kořínek enskribon pri la lasta Komitata Kunveno. Poste tralegas s-ano Kořínek la sekretarian raporton pri la ĵus pasinta jaro. La komitatanoj ĝin aprobas kaj sugestas etan kompletigon. Poste s-ano Borkovec donas tre detalan kasistan raporton. Anticipas konfirmo kaj bontrovo de la revizoro s-ano M. Němec, kiu detale kaj akurate ĉiun someron kontrolis kaj trovis ĉion en modela ordo. En koncizeco estu notite, ke la enspezoj sumis 21.946,10 Kčs, la elspezoj 21.286,30 kaj la kasa stato estis aktivo Kčs 659,80. La komitatanoj aprobas la kasistan raporton de s-ano Borkovec. Plue oni traktas pri la nova kandidata listo. Oni proponis anstataŭ la soldatanta s-ano Kovář elekti en la komitaton s-anon Dron Inĝ. Jaromír Šikula, kaj lia nomo estos metita en la liston. Poste oni traktis pri la balo. Estis decidite mendi 100 biletojn kaj la ne malmultajn iradojn al la oficoj tre bonvole prenis sur sin s-ano Friedrich. La enirpago estis fiksita je 30,- Kčs.

La kunveno estis finita je la 10.15.

Enskribis Jiří Kořínek

Enskribo

pri la komitata kunveno okazinta la 3-an de februaro 1953 en la klubejo en hotelo Passage. Komenco je la 21,40. Kunsidis la ĵus novelektita komitato: Jos. Vondroušek, Jos. Friedrich, prof. V. Scheiber, T. Borkovec, Draha Chlubnová, Jiří Kořínek. Estis dividitaj en funkcioj jene: Prezidanto Jos. Vondroušek, vicprezidanto Jos. Friedrich, la sekretario Jiří Kořínek, la sekretario Marie Adamcová, kasisto: Tomáš Borkovec, bibliotekistino Nelly Zitová, estro de artprogramaj aferoj prof. Vilibald Scheiber, gvidantino de junulara sekcio Drahomíra Chlubnová, kaj komitatano. Dro Inĝ. Jaromír Šikula. Revizoroj Miroslav Němec kaj Sáva Střelec. Finite je la 22.¹⁰.

Enskribis Jiří Kořínek

Enskribo

pri la komitata kunveno okazinta la 20an de oktobro je la 22a horo. Ĉeestis gesamidanoj: Vondroušek, Adamcová, Zitová, Chlubnová, Borkovec, Kořínek. Post tralego de la lasta enskribo konstatas s-ano Vondroušek, ke bedaŭrinde ni ĉi-aŭtune ne povas gvidi kursojn, ĉar Kleriga Societo de Komenský ne enplanigis Esperanton, kvankam aliloke (Přerov, Opava k. alie) Klerigaj Societoj malfermis ree kursojn. S-ano Kořínek proponas, ke ni aranĝu en iu frekventata strato en iu libera varfenestro imponan ekspozicieron de Esperanto literaturo. Tio fariĝu netruda atentigo pri Esperanto kaj event. varbilo por kurso. S-ano Kořínek prenis sur sin la taskon esplori, kie tia elmontra fenestro estus akirebla. Poste s-ano Vondroušek proponas, ke la klubo donu donacon al s-ano Kamarýt, kiu jubileos la 10an de nov. sian 70an naskiĝtagon. Post diskuto oni interkonsentis aĉeti korbsimilan skatolon kun delikataĵoj (bongustaĵoj). Estis decidite oferi por tio 100-200 Kčs. La taskon prenis sur sin s-aninoj Vondroušková kaj Adamcová.

Finite je la 22.⁴⁵a horo.

Enskribis Jiří Kořínek